
LA DEK-SEPA



Organe Mensuel Espérantiste.

RÉDACTION ET ADMINISTRATION : H. de COPPET
179, Boulevard Pereire, Paris.

ABONNEMENT : *France*, 1 franc. — *Etranger*, 1 fr. 50 par an.
Ne paraît pas en Août et Septembre.

TARIF DES ANNONCES :
Une année : 1/4 page, 40 fr. ; 1/2 page, 70 fr. ; une page, 120 fr.

GRUPO FUNDAMENTISTA « LA DEK-SEPA »

Groupe Espérantiste du XVII^e Arrondissement de Paris.

Réunions amicales tous les Mercredis soirs, à 9 heures,
Café de la Gare, 6, Place Pereire, Paris. Entrée particulière.
Téléphone 530-46. Métro : Pereire.

Nos Diners mensuels.

Les prochains Diners mensuels du Groupe auront lieu
les Mercredis 5 Mars et 2 Avril 1913, à 8 heures très
précises du soir, Café de la Gare, 6, place Pereire, Paris.
Prix : 3 fr. 25 (boisson et pourboire compris).

Prochaines Réunions.

- 5 Mars. — Monata vespermango sekvata de esper. ludoj.
- 12 Mars. — S-ro Eskler : Pri rusaj moroj.
- 19 Mars. — S-ro Georges Lhermitte : Sentema paroladeto.
- 26 Mars. — S-ro Henri de Coppet : Turistaj vagadoj (lum-
bildoj),
- 2 Avril. — Monata vespermango sekvata de esper. ludoj.

RÉUNION MENSUELLE DES GROUPES PARISIENS

Les membres du « Grupo Fundamentista La Dek-Sepa » sont invités à la réunion mensuelle des Groupes Espérantistes Parisiens, réunion qui aura lieu le Vendredi 7 Mars 1913, à 9 heures du soir, au Groupe « Verda Stelo », 129, rue Marcadet, Paris.

Le Secrétaire : ROBERT BOLLACK.



L'Esperanto à Paris et en Banlieue.

L'Association Commerciale et Industrielle Espérantiste vient de fonder un Office Commercial Espérantiste à Paris, 43, rue du Faubourg St-Martin (1, passage Brady). Cours d'Esperanto tous les jours, à 8 heures et demie du soir. — Le jeudi, deux fois par mois Cours supérieur, par M. le Professeur Th. Cart.



Nouveaux cours d'Esperanto, sous les auspices de l'Ecole de la Paix, 28, Boulevard St-Marcel, Paris.



M. Chassin, maire du 20^e Arrondissement de Paris, et M. Lainé, adjoint au maire du 19^e Arrondissement de Paris, ont adhéré au nouveau Groupe Espérantiste Fundamentiste « Paris-Est ».



La fête qui a eu lieu au Pré Saint-Gervais (Seine), le 19 Janvier dernier, a pleinement réussi. Cette fête était rehaussée par la présence du maire du Pré Saint-Gervais et du Conseiller général.



Un Groupe Espérantiste s'est fondé à Suresnes. M. L. Chilard, qui est membre du Comité du « Grupo Fundamentista La Dek-Sepa », est le président du nouveau Groupe de Suresnes.



AVIS IMPORTANTS

Le Neuvième Congrès International d'Esperanto, qui devait avoir lieu à Gênes, se tiendra à **Berne**, du 24 au 31 Août 1913.

Le journal « Esperanto » de Genève, est l'organe du Congrès.

* * *

Le Congrès annuel français (S. F. P. E.) aura lieu à Toulouse, le jour de Pâques (23 Mars 1913).

Aucune communication ne nous étant parvenue à l'heure où nous imprimons, nous prions nos lecteurs que la chose intéresse de s'adresser au secrétaire du Groupe de Toulouse, M. BEAUMEL, 5, rue des Lois, Toulouse.

La monato Esperantista.

En Paris nova Komerca Oficejo Esperantista malfermiĝis. Tiu oficejo estas organizita de la Esperantista Komerca kaj Industria Asocio.

En Suresnes (apud Paris) fondiĝis nova grupo esperantista, kies prezidanto estas nia fundamentista amiko S-ro L. Chilard.

En Nice fondiĝis nova grupo esperantista katolika.

En Carcassonne, nova kurso de Esperanto en la laborista rondo.

En Douai okazos la 1-an de Junio la Kongreso de la Norda Esp. Federacio.

Eksterlande nia movado ankaŭ rapide antaŭeniras.

En London (Nordo de la urbo), 17 infanoj lernis nian lingvon ĉe Liddon Memorial School. — Paroladoj okazis en Hastings, Manchester, Sheffield, k. t. p.

La nacia angla Kongreso Esperantista okazos dum Pentekosto (11-an de Majo) en Eastbourne (Devonshire).

La nacia germana Kongreso Esperantista okazos en Stuttgart la 19-an kaj 20-an de Aŭgusto 1913.

Esperanta Semajno okazos en Gent, dum Aŭgusto 1913. Tiu semajno estos certe sukcesplena, ĉar okazos ankaŭ tiun jaron en Gent ekspozicio universala kaj internacia.

En Haarlem (Nederlando) fondiĝis nova grupo, kies titolo estas « Ni laboru kaj esperu ».

Fine ni sciigas al nia legantaro, ke la Naŭa Kongreso de Esperanto okazos en **Bern** (Svisujo), de la 24-a ĝis la 31-a de Aŭgusto 1913.



En *Lingvo Internacia*, profesoro Th. Cart sub la titolo « Morala forto » esprimas altan ideon kaj diras :

« Se nia movado ne ripozas sur morala forto, kion ajn povas diri moke la « praktikaj » kaj « modernaj » homoj, ĝia intenseco malpliigos ĉiutage pli kaj pli. Nia novjara deziro en la esperantista almito estas, ke en ĝi ĉiam pli klare certigu tiu granda morala forto, kiu malgraŭ ĉiuj baroj fine kaj fatale kondukas al la venko. »

En *Le Monde Espérantiste* S-ro Paul Fruictier, konstatinte, ke en la grupoj esperantistaj, se novaj membroj aliĝas, multaj ankaŭ forlasas la grupojn post kelkmonata ĉeestado, skribas :

« Mi do deziras tiri hodiaŭ la atenton de miaj legantoj al tiu grava problemo, de kies solvo dependas grandparte la estonteco de nia afero. Mi esperas, ke ili volos esplori ĝin detale kaj helpi min trovi taŭgan rimedon por resanigi nin de tiu malsano. Por atingi tiun celon, ni devas imiti la kuracistojn : ili serĉas ĝiajn kaŭzojn kaj poste trovas efkan kuracilon resanigontan por forigo de tiuj kaŭzoj....

... Mi do invitas miajn legantojn esplori tiun aferon kaj respondi al la sekvantaj demandoj :

1-e Kial multaj Esperantistoj forlasas Esperanton kaj ĉian agadon por lingvo internacia entute post kelkatempa fervoreco ?

2-e Kiel fari por malhelpi tion ĉi kaj konservi ilin al nia afero ? »

Karaj gelegantoj, ĉiu el ni devas nepre diri sian opinion pri tio.

Laŭ mi la kaŭzo estas :

1-e Ke kelkaj membroj forlasas Esperanton, ĉar ili nur deziris havi sciigon pri la demando ;

2-e Ke multaj nin forlasas, ĉar tro ofte anstataŭ trovi modestulojn, ili vidas « eminentulojn » fiercajn en esperantistaj kunvenoj.

Robert Bollack.

ÉCHOS

Les roses et l'Esperanto. — Les horticulteurs des cinq parties du monde ont reçu dernièrement une circulaire officielle émanant du conservateur du Bois de Boulogne. Elle les invitait à prendre part à un concours international de roses qui aura lieu au mois de Mai, dans la roseraie de Bagatelle.

La circulaire était rédigée en Français, en Anglais et en Allemand, quand on s'avisa qu'une quatrième langue pourrait être d'un grand secours — et l'on choisit l'Esperanto.

C'est là une initiative remarquable qui prouve à quel point la langue auxiliaire internationale a pénétré, non seulement dans tous les milieux, mais encore dans tous les pays. Chaque jour davantage elle rentre dans la pratique, et le fait que nous venons de citer ne manque pas d'éloquence à cet égard.

M. Raymond Polncaré linguiste. — On a dit bien des choses de l'éminent homme d'Etat que la nation vient de se donner pour chef; mais bien peu ont signalé dans sa biographie l'effort auquel il s'adonna de créer une langue internationale....

Jeune homme, il avait pourtant nourri ce projet à la fois très audacieux et très noble. Comprenant le progrès énorme que pourrait faire l'humanité le jour où seraient abaissées les barrières des langues, il tenta de la doter d'un idiome neutre qui pourrait servir de truchement universel.

Ce ne fut pas un simple projet. Avec son frère Lucien — celui-là même qui devait devenir un des plus grands savants de ce siècle — il rédigea les éléments d'une langue qu'il appela *L'ixessoire*. Il en fit paraître une édition autographiée chez l'imprimeur Chuquet.

Plus tard, les occupations de cet homme prodigieusement actif, ses plaidoiries et ses campagnes politiques, lui firent abandonner cette œuvre trop absorbante.

Mais il n'a pas oublié le rêve de sa jeunesse, et, puisque un autre a réalisé ce que lui-même avait cherché, puisque Zamenhof a créé *l'Esperanto*, les Espérantistes sont certains de trouver en lui un ami puissant et bienveillant.



ĈE LA KURACISTINO

KOMEDIETO

(Daŭrigo kaj fino.)

SCENO VI.

S-RO TURPIN, *sekvita de ROZETO*. — Oskaró, mia kara infano, venu por ke mi premu vin kontraŭ mian koron. Ĉu vi do estas reveninta al la vivo! Ho! Kiel mi estas feliĉa, retrovante vin starantan kaj tute sanan. Sinjorino, mi neniam povos sufiĉe esprimi al vi mian dankemecon.

S-INO ALLARD. — Ne estas mi, kiun vi devas danki, sed mia nevino.

S-RO TURPIN. — Ĉu vi do ne estas plu Doktorino?

S-INC ALLARD. — Jes, sed mia nevino plenumis la kuracadon, kiun mi montris.

S-RO TURPIN, *salutante kun mano sur sia koro*. — Sinjorino, Fraŭlino, Sinjorinoj... mi ne scias kion diri; sed mi estas treege kontenta!

OSKARO. — Fraŭlino, permesu, ke mi esprimu miajn sentojn de sincera dankeco.

ROZETO. — Mi estas tre feliĉa, ke mi povis helpi vin.

S-RO TURPIN. — Nun, ni iru vespermanĝi. Mi havas apetiton nesateblan. La rebonigo de la kurteno unue, la klopodoj ĉe la farmaciisto due, poste la timo, la ĝojo, la kortuŝeco, ĉio tio malplenigis mian stomakon. Sinjorinoj, ĉu vi volas fari al mi la honoron akcepti vespermanĝon kun mi, en la plej bona restoracio Pariza?

KONTRAŬ
M A R -
MAL-
SANO

DELPHININE

KONTRAŬ
FERVOJ-
MAL-
SANETO

De l' DOKTORO FLASSCHÆN.

Tiu ĉi farmaciaĵo, absolute sendanĝera, ricevis la **Grandan Premion** ĉe la Internacia Ekspozicio de Higieno, okazinta en Parizo en 1908.

Prezo de la boteleto : 10 fr. (4 S).

Aĉetebla ĉe S-ro WBITZ, 8, Rue de Duras, Parizo
kaj ĉe ĉiuj farmaciejoj.

S-INO ALLARD. — Danke, Sinjoro: sed honestaj sinjorinoj ne akceptas vespermanĝon tiel, kun sinjoroj, kiujn ili ne konas.

S-RO TURPIN. — Kiel... kiujn ili ne konas! Vi scias, ke mi naskiĝis en Castelsarrazin, lando kara al mia koro, ke mi havas nevon, kiun mi amas.

ROZETO. — Tio estas vera, verega.

S-RO TURPIN. — Ke mi estas bona fraŭlo, ke mi havas riĉaĵojn.

OSKARO. — Ĉio tio estas ankaŭ vera.

S-RO TURPIN. — Sed kion vi ne scias, kaj kion mi al vi deziras konigi estas jene: ambaŭ vi estas al mi tute simpatiaj: kaj ne nur mi deziras vin konduki ĉe la manĝejon, sed plie mi dezirus vin veturigi kun mi Castelsarrazin'on, lando kara al mia koro!

S-INO ALLARD, *ridante*. — Sed sub kia titolo?

S-RO TURPIN. — Vi, Sinjorino, sub la titolo de edzino rajta, kaj vi, Fraŭlino, sub la titolo de nevino ne malpli rajta. Kion vi pensas pri tio, Oskaro?

OSKARO. — Mi pensas tute kiel vi, mia bona onklo, kaj mi benas la malsaneton, kiu ebligis, ke mi konatiĝis kun tiuj sinjorinoj.

S-RO TURPIN. — Tamen, se vi estis malsana, estis dank' al mi.

OSKARO. — Dankon, mia onklo. Tiajn bonfarojn oni ne forgesas.... Sed ni atendas la respondon de tiuj sinjorinoj.

S-INO ALLARD. — Certe, ni estas tre dankemaj pri viaj gentilaĵoj, pri viaj afablaj proponoj. Sed mi estas vidvino kaj mi pliamas konservi mian liberecon kaj mian situacion.

S-RO TURPIN. — Ve! kiam mi, por la unua fojo, renkontas personon simpatian, ŝi repuŝas min.... Kial? Tial, ke



LA VERA TIZANO DE L' PASTRO DE DEUIL

preparita de S-ro Duvergier, en Argenteuil, mirinde efikas kontraŭ ĉiuj doloroj, reŭmatismoj, neŭralgioj, kontraŭ la aĝatakoj, la mallakso kaj la grasegeco.

La paketo : 1 Fr. 50 (Sm. 0,60)

===== Tuj ricevebla kontraŭ poŝtmandato. =====

Specimeno kaj broŝuro senditaj senpage tuj post demando al
S-ro DUVERGIER, 9, Rue Laffitte, Paris.

mi estas el Castelsarrazzino, ke mi estas malbela, peza, kolerema, trudema, kaj precipe tial, ke mi al vi faris salutojn sur seĝo, kiam mi vidis vin, Sinjorino, la unuan fojon. (*Montrante pugnon al la fenestro.*) Ho! malbenita kurteno!... Sed ni ne havas respondon de Fraŭlino Rozeto.

S-INO ALLARD. — Antaŭ ĉio, vi devas scii, ke Rozeto havas nenion kaj ke ŝi laboradas por vivi.

S-RO TURPIN. — Nu, ŝi vivos por sin amuzi. Mia nevo amas Fraŭlinon Rozeton: mi tuj vidis tion laŭ la maniero per kiu li turnas sian ĉapelon. Fraŭlino Rozeto havas simpatian por tiu fripona Oskaro, ĉar ŝi lin revivigis. Vi scias, ke ĉiam oni amas la personojn, kiujn oni savis: estas humana sento. Ni edziĝu tiujn du infanojn, kaj al ili mi starigos riĉan estontecon.

OSKARO. — Ho, Fraŭlino Rozeto, ĉu vi konsentas doni al mi tiun feliĉon: ĉiam esti apud vi dum la tuta vivo, kiel antaŭ ne longe, en la bona kaj la malbona sorto?

ROZETO. — Permesu, Sinjoro, ke mi pripensu iomete pri tiu grava propono, kaj ke....

S-RO TURPIN — Ne, ne, vi ne bezonas perdi tempon. Mi certigas al vi, ke mia nevo estas bona, honesta, laborema junulo, plie li estas bela knabo. Ĉu ne?



Muzikeldonejo A. BESNARD

26, rue Antoinette, 26 -:- PARIS

Esperantia Entrepeno. — Komerca Konsulo de U. E. A.
Konto ĉe Ĉekbanko Esperantista.

Specialvendejo de esperantaj gramofonaj diskoj, gramofonoj, violonoj, mandolinoj, gitaroj, k. t. p.

Komerco kaj eksporto de klasikaj kaj modernaj muzikaĵoj por ĉiuj muzikiloj, esperantaj kaj ĉiulingvaj kantoj.

SENSACIA NOVAJO !!! ESPERANTAJ DISKOJ !!!

KANTOJ	}	La Espero	L. L. ZAMENHOF
		Al vi	BEMBERG
DEKLAMOJ	}	Preĝo sub la verda standardo	L. L. ZAMENHOF
		Blanka vualo	V. DEVJATNIN

Ĉiu duobla disko: 4 fr. (1,600 Sm.)

Katalogoj estas sendataj senpage al ĉiuj dezirantoj.

ROZETO. — Ho! Kia demando!

OSKARO. — Mia onklo, vi faras min ridinda!

S-RO TURPIN. — Ridinda, estas nur por mi, ke tiu vorto taŭgas, mi ĝin scias tre bone. Sed vi ĉiuj tiel babiladas, ke mi ne povas aldoni eĉ unu vorton. Sinjorino, mi survestas miajn gantojn por peti de vi la manon de Fraŭlino Rozeto, por mia nevo. Respondu tuj: jes; se ne, mi svenos.

S-INO ALLARD, *ridanta*. — Ni estos tri por vin flegi.

ROZETO. — Fartu bone, sinjoro, kaj sciu, ke mi benas la magnetismon, kiu min konigis al sinjoro via nevo.

OSKARO. — Fine, mi havos la ĝojon edziĝi kun mia kara kuracistino.

S-RO TURPIN. — Vivu la ĝojo! Mi ne bedaŭras mian vojaĝon en Parizon. Ha! kiel funkciados ĉiuj langoj en Castelsarrazin, lando kara al mia koro!!

S-INO VALLIENNE.

(Tradukita de D-RO VALLIENNE.)

Bibliografio.

Tri Angloj Alllande, de John Merchant. — Presita de J. W. Northend, Sheffield. Aĉetebla ĉe « La Espero », Lynette Avenue, Clapham Common, London S. W. — Prezo, frankite: unu ŝilingo (0 Sm. 500). — Jen tre rekomendinda libreto, skribita en plej pura fundamenta stilo. La aŭtoro, tre modeste, diras en sia antaŭparoleto, ke Gesinjoroj Paul Blaise helpis lin en la korektado de l' verko; efektive, mi nur trovis du aŭ tri fojojn la uzadon de l' verboj *ignori* kaj *heziti* en la 95 paĝoj de la libreto. Ni varme rekomendas ĝin al niaj gelegantoj.

Karaktero, laŭ J. M. Van Stipriaan Luisius. 30 p. 13×19. — Librejo « Espero », Hago (Nederlando). — Prezo: 0 Sm. 200. — La verko meritas atentan legadon, la stilo estas klara kaj mallonga. La verkinto dividis sian verkon en tri partojn: 1) Kio estas karaktero? 2) Kiel oni ĝin formas? 3) El kio konsistas bona karaktero? — Oni trovos eltiraĵon en tiu ĉi numero mem. Mi nur sincere bedaŭras, ke la aŭtoro kelkafoje deflankiĝas de la gramatiko kaj uzas nebezonatajn novajn vortojn. Malgraŭ tio, mi gratulas la verkinton pro la altvalora temo, kiun li entreprenis trakti, kaj mi deziras al lia verko plenan sukceson.

H. DE C.

KARAKTERO

Karaktero rilatas al homo kiel direktilo al ŝipo; ĝi estas nia vivkondukilo sur nia vivmaro. Ĝi estas nia konstanta volo aranĝi nian faradon kaj nefaradon laŭ antaŭe decidita plano. Ĝi estas nia principo aplikita al nia vivo. Ekstere ĝi estas tio, kio distingas nian faradon kaj nefaradon de aliaj, kaj interne tio, kio difinas nian faradon kaj nefaradon. Ĝi estas la detale plenumita ĝenerala devo, kiun ni altrudis al ni mem.

Distingilo de l' karaktero estas la konstanteco. Ne ĉiu, kiu persistas, havas karakteron, sed ĉiu, kiu havas karakteron, persistas. En la principopersistado kuŝas la karaktero. « La persistanto gajnos » estas la devizo de ĉiu homo kun karaktero. « Ĉio alvenos ĉe tiu, kiu scias atendi », estas la ĝusta konsolmotivo por ĉiu, kiu havas karakteron. « Neniam cedi kaj neniam malesperi »; « ne nur labori sed ankaŭ atendi », « kiam la defluo estas plej malproksima, la alfluo estas plej proksima » estas la devizoj de ĉiu karaktero.

La granda Amerika verkisto pri karaktero, O. S. Marden, faras la sekvantan rakonton pri manko je persisto. « Iam estis videbla, dum foiro en Skotlando, modelo de riĉa ormino. La unua entreprenanto de tiu mino estis elspezinta milionojn kaj post unu kaj duona jaro perdis la esperon trovi oron kaj vendis la minon por bagatelo. La nova posedanto fosigis plue kaj trovis riĉan orkanalon la unuan tagon! » Tiel la horo de l' vivo povas esti tre proksima de la senkuraĝigitoj.

Karaktero nobligas. Nek la imperiestro, nek la reĝo, nek la ministro, nek la parlamentano, nek la naskiĝo, nek la mono, nek la mieno povas doni al iu la veran nobelecon, sed tion oni mem nur povas fari formante noblan karakteron. Karaktero estas la plej bela ordenaĵo, bona karaktero estas

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

SE VI SUFERAS pri la STOMAKO aŭ la INTESTOJ, ne hezitu unu minuton provi la

MAYA BULGARE

Bulgara Lakta Kazeaĵo, kaj vi neniam plu suferos.

Informoj estas riceveblaj de la Societo

Maya Bulgare, 332, rue St-Honoré, Paris. Téléphone 214-40.

la vera nobeleco. Bona karaktero estas pli bona ol bona kariero, ĉar la unuan oni ofte havas per merito kaj la duan oni ofte havas per favoro. Karakternobeleco estas la vera nobeleco.

Karaktero estas pli ol prudento. Parteto de karaktero estas pli ol monto de prudento. Koro valoras pli ol kapo. Kondukado staras pli alte ol la scio kiel kondukadi. Bona prudento tre multe valoras, sed bona karaktero senfine pli valoras. « Se scio povon donas, karaktero faras la viron estimata », iam diris Nederlanda profesoro. Karaktero pravigas konfidon kaj estimon, prudento povas akompani malbonecon. Karaktero kaj prudento ne staras sur la sama vico.

Karaktero estas kontrasto al aspekto. Agrabla mieno estas fonto de profito. « La unua povas ĉevalon ŝteli, la alia ne rajtas transvidi barilon » estas vera proverbo. Agrabla mieno malfermas ĉiujn pordojn, sed bona koro malfermas la korojn. Mieno altiras sed koro ligas. Agrabla mieno donas konatojn, bona mieno donas amikojn. Agrabla mieno ofte kondukas al riĉeco, bona koro ĉiam al feliĉo. Kvieta konscienco estas ĉiutaga festo », ankaŭ por ekstere malfavorigitoj.

Karaktero pli valoras ol mono. Iom da mono estas necesa kaj ofte malfacile akirebla, sed multe da mono estas danĝera. Multe da mono povos esti malbeno aŭ beno, laŭ tio kio estas la karaktero. Per mono oni povas multon aĉeti, sed ne la plej multekostajn aferojn. Amo, amikeco, atestimo kaj memkontentigo (ne parolante pri saneco) ne estas aĉetebaj per mono, sed certe per karaktero. Per karaktero oni povas fari pli da bono ol per mono. Rideto, saluteto, manpremo, konsilo, alkuraĝigo, afabla vorto pli valoras ol mono.

Ĉiu karaktero estas memstara; ĝi estas sendependa; ĝi agas laŭ propraj komprenoj; ĝi ne deziras protekton; ĝi apogas sur si mem sola. Ĝi enradikiĝas en devokonscio, sed ĝi vivas en libereco. Karaktero lasas ĉian kredon netuŝita kaj povas harmonii kun ĉia religio, sed ĝi iras laŭ nenies kondukilo. Ĝi plenumas la devon altruditan de aliaj, sed en la limoj de propra devo. Ĝi respektas la komprenojn de aliaj kaj aŭskultas konsilon, sed decidas mem. Karaktero ne toleras kundirektanton apud si mem.





Vera
 Ferhava Salo
 alsimiligobla

ELTROVITA DE
 M. Maurice ROBIN
 en 1881.

LA
 Fer Robin

mirinde efikas
 KONTRAŬ
 SENSANGECO,
 PALKOLOREGO,
 SANGELFLUOJ
 ĜIUSPECAJ

Akcelas la nutraron kaj
 noniam mallaksigas.

Tia ĉi kuracilo, abso-
 lute sengusta, oni uzas laŭ
 la dozo de 10 ĝis 30 gutoj
 ĉu ĉiu mango, ĉu en iom
 da akvo aŭ vino. La en-
 havo de la botoleto repre-
 sentas la daŭron de tri se-
 majnoj ĝis unu monato da
 kuracado.

Por eviti la falsajojn
 POSTULU la ROBIN

VENEREJO POGRANDE:
 13, Rue de Poissy, PARIS